HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.*
Redakcio-Administracio: *T.Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.*
Heroldo aperis semajne antaŭ la milito ; ĝi reaperos semajne, kiam eble.
Jarabono 1946 : *por Belgujo 90 fk., Nederlando 5 gld., cetere 10 angl. ŝil.*
Anoncetoj : *20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fk. 20.—, gld. 1.— ktp.*

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 8 (1057) FONDITA EN 1920 — 22-a JARKOLEKTO 15 Novembro 1946

La subskriboj por la Peticio al UNO superis en la komenco de oktobro 150.000. Sendube, atentinda cifero. Sed por impresi la mondon ĝi devas multobliĝi. Ĉu ni ne povus atingi milionon ? Se ĉiu faros sian devon, ni certe sukcesos.

****

Homa solidareco

La nova Brazila Konstitucio.

En la 18-a de septembro 1946 estis subskribita la nova kaj tre moderna Konstitucio por la Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilo. Ĝi nuligas plurajn naciismajn tendencojn de la antaŭa kaj starigas principojn tre demokratajn. Espereble, kompetentaj juristoj, kiaj estas niaj samideanoj D-roj Carlos Domingues, Miĥael Timponi k.a., oportune tradukos kaj komentarios ĝin por la esperantistoj. Mia celo de simpla civitano estas malpli ambicia.

Mi nur deziras anonci al la legantoj de Heroldo, ke la brazila popolo jam havas fundamentan leĝon, kaj traduki nur unu el la paragrafoj de tiu grava politika dokumento. Ĝi estas la 166-a paragrafo, kiu tekstas jene :

« *Edukado estas rajto de ĉiuj kaj estos farata en hejmo kaj lernejo. Ĝi devas esti inspirata laŭ la principoj de libereco kaj la idealoj de homa solidareco.* »

Tiun celon — « la idealoj de homa solidareco » — ne havis la antaŭa Konstitucio, ĉar en ĝi nenia celo estis menciita pri la popola edukado.

Ni esperu, ke tiu konstitucia principo, kiu certe estas en la koro de ĉiu vera esperantisto tra la mondo, fariĝu vera standardo por la brazila kaj aliaj popoloj. Ĉu tiu celo aperas en konstitucioj de aliaj landoj? Jen demando, kiun ĉiu esperantisto povus respondi per Heroldo en mallongaj notoj. Eble ĝi ekzistas en aliaj konstitucioj, kaj la brazila akceptis kaj represis la principon. Mia supra traduko estas tute laŭvorta. Eble ni povus redakti iom pli libere jene : « *Edukado inspiriĝu en la principoj de libereco kaj en la idealoj de tuthomara solidareco.* »

En famaj paroladoj la karmemora Prezidanto Roosevelt instruis similan principon per la vortoj : « Dum tuta jarcento ni kantis tra la tuta Ameriko la gloron de Interdependeco. » La penso estas la sama : ĉiuj homoj kaj ĉiuj nacioj estas solidaraj kaj interdependas unuj de aliaj.

Al mi ŝajnas, ke la paroladoj de Prezidanto Roosevelt kaj tiu paragrafo de nia nuna Konstitucio montras tendencon de la homa spirito en la Nova Mondo : la komprenon, ke la malnova idealo de absoluta suvereneco de la nacioj estis eraro, stultaĵo ; ĉar vere la suvereneco de pluraj eŭropaj nacioj falis sub la reĝimo de nazioj, kaj ankaŭ la suvereneco de Germanujo kaj Japanujo jam falis sub pli grandaj fortoj. Ĉiuj nacioj, same kiel ĉiuj individuoj, dependas por sia feliĉo de la kunlaborado de aliaj ; sekve la popoloj interdependas kaj la solidareco de ĉiuj estas la vojo por la feliĉo de ĉiuj.

La plej altan nivelon de nacia aroganteco atingis faŝismo kaj naziismo, sed ilia vivo estis tre mallonga kaj pereigis siajn proprajn naciojn. Eble la homaro lernos la historian lecionon kaj ŝanĝos sian vojon.

I.G.B., Brazilo.

BERN 1947

Informoj pri la restado.

La 32-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la plej vigla turisma sezono, nome de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1947. Pro la grandparte ankoraŭ malfacilaj cirkonstancoj en la landoj, partoprenintaj en la milito, Svislando estas de post la milito la preferata celo de alilanda publiko. Tio donas al la organizantoj de la kongreso tre malfacilan taskon. Hotelĉambroj estas malmultaj disponeblaj, eĉ ĉambroj ĉe privatuloj ne sufiĉas ; sekve la plimulto de la kongresanoj devos kalkuli je ia amasa restejo, en lernejo aŭ kazerno, sed ĉiu persono ricevos sian propran liton.

Ankaŭ rilate la nutradon ekzistas malfacilaĵoj. Pro tio la Loka Kongresa Komitato devis fiksi la *aranĝon de la restado kaj nutrado kune,* por la tuta tempo de la 26-a de julio vespere ĝis la 2-a de aŭgusto posttagmeze. La aranĝo konsistas do en : tranokto, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj trinkmono (kaj ĉe hoteloj ankaŭ transporto de la pakaĵoj). Loĝontoj en privataj ĉambroj aŭ amasrestejoj povos laŭ elekto manĝi en diversaj restoracioj. Por la amasloĝantoj oni havos du kategoriojn, kies diferenco konsistas en pli aŭ malpli modesta nutrado.

Jen la prezoj por la diversaj aranĝoj :

A. Hotelĉambroj.

Kategorio I (luksa) sv. fk. 205.—; kat. II (komforta) 155.— ; kat. III (modesta) 130.—.

B. Ĉambroj ĉe privatuloj.

Prezo sv. fk. 120.—.

C. Amas-restejo.

Kategorio I sv. fk. 110.— ; kategorio II sv. fk. 85.—.

D. Tendkampo.

Je distanco de 2 km. de la kongresejo (en Eichholz) troviĝas bela kaj bona tendkampo. Por eksterlandanoj ĝi estas tute senpaga. Eble troviĝos kelkaj tendoj por tiuj, kiuj ne povos kunporti tendon ; luprezo 1 sv. fk. por ĉiu nokto.

Baldaŭa aliĝo al la kongreso kaj baldaŭa mendo de ĉambro, ĉu en hotelo, ĉu ĉe privatuloj, ĉu en amasrestejo estas necesa, kaj la kongreskomitato povas garantii pri la restado dezirata de kongresano nur, se li sekvas la instrukciojn. Ankaŭ pro tio estas rekomendinde aliĝi frutempe, ĉar en multaj landoj estas devizaj malfacilaĵoj, kaj oni devas ĝustatempe klopodi pri la necesaj permesoj. Samtempe kun mendo de unu el la supre cititaj kategorioj oni pagu la tutan monsumon al iu banko, por la konto de la 32-a Univ. Kongreso de Esperanto 1947 en Bern, per Schweiz. Volksbank en Bern.

Ĉu la eklezio kunkulpas ?

Sub la titolo : « Ĉu la eklezio kunkulpas je milito ? » oni povis antaŭ nelonge legi en la svisa gazetaro la sekvantan alvokon (tradukis : F.L., Svislando) :

Karaj gekristanoj !

Per la fakto, ke la milito finiĝis, la paco bedaŭrinde ankoraŭ ne estas gajnita. Nek ĉe la venkintoj kaj venkitoj, nek ĉe la aliaj kaj ni estas venkita la spirita sinteno, kiu kondukis al la milito, kaj denove minacas eksplodigi ĝin. La vera paco neniam venas tiel facile. Ĝi devas esti gajnata per grandaj penoj kaj oferoj. Sed ne nur tial ni batalu por ĝi, ĉar la tuta homaro deziras ĝin, sed ankaŭ tial, ĉar ni ĉiuj estis destinitaj kiel sekvantoj de nia majstro Jesuo.

Ne sufiĉas ke ni abomenu la militon kaj serĉu la kulpulojn. Ankaŭ ni kristanoj konfesu nian parton je la kulpo de la homaro. Ni ĉiuj kulpas, ĉar post la unua mondmilito ni lasis la zorgon por la paco en la manoj de l' politikistoj, kaj ĉar ni toleris ke la ateismo kaj la egoismo faris la alvokon « Neniam plu milito ! » iluzia. La mondhistoria horo, kiun Dio prezentis al la homaro, preterpasis ne trovinte uzadon. Ni kristanoj portas la respondecon ke tio ĉi ne ripetiĝu.

Ne sufiĉas, ke ni neu la mondon de l' milito ; ĉar ĝi gvidas la tutan homaron al la korpa kaj morala abismo. La kristana eklezio estas destinita por absolute proklami la sanktan volon de sia majstro, kvankam tiu ĉi volo tute kontrastas la nunan mondon Tio estas, jesi per vortoj kaj agoj la fortojn de l' justeco, de l' homaro kaj de la frata komuneco kaj meti la dian regnon super ekonomiaj kaj naciaj celoj.

Same ne sufiĉas, ke ni nur havu la bonan volon. Kiel rapide ĝi kapitulacas antaŭ la ekzistantaj faktoj, kiel facile fiaskas pro timo antaŭ potenco kaj amo je la mono ! Nur la kredo, ke tio, kion Dio intencas, neniam estas neebla, kaj ke Dio venkos la tutan potencon de l' malbono, gajnos la venkon. Tiu ĉi kredo estas proklamota de el la preĝejo : ĝi respondecas nur al sia majstro kaj al neniu homa instanco.

Tia vivanta kredo kondukos nin antaŭen sur la vojo de bona pacordo. La vojo sen kredo kondukos nin en la abismon. Kompreneble, ne alportante oferojn de ĉiu popolo, oni apenaŭ sukcesos. Rifuzi ilin per malkredo, certe kaŭzos pli dolorajn katastrofojn. Estas sankta devo de l' kristanaro, antaŭenmarŝi kaj prezenti sian volemon.

La ekzistantajn danĝerojn ni ne venkos kaj forigos per la daŭrigata armado, priskribita en la libro « Burĝo kaj soldato ». Tio ne estas la vojo de l' savado. Tiu spirito fortigas nur malfidon kaj timon, estigas nur paralizitan atmosferon, kiu ne kapablus rezisti al tria mondmilito, kaj malebligos ĉiun paŝon al la efektiva paco. La kristanaro subtenu kaj akcelu ĉiujn klopodojn de l' rajto, de l' kompreno kaj de l' fido, kiuj deziras konstrui novan popolkomunecon.

La bonvolaj homoj inter ĉiuj popoloj, kiuj pretas marŝi sur ĉi tiu vojo, devas batali malfacilan batalon. Ili nur sukcesos, per la kompreno kaj la pledo de siaj kunkristanoj, kaj trovante fortan subtenon de l' eklezio. La alvoko de la eklezio direktiĝu al la kristanaro, kaj la gekristanoj en la tuta mondo interligiĝu. (Suplemento de l' tradukinto : Ni esperantistoj bone konas la belegan rimedon subteni interligojn kun la kristanoj en la tuta mondo. Nia grava ŝlosilo estas Esperanto ! Do, ĉiu ankaŭ lernu la belan, utilan mondlingvon.)

Per ĉi tiuj vortoj ni anonciĝas ĉe ĉiuj kristanoj petante ilin, ne atendi, ĝis ili estos alvokataj de la estraroj aŭ pastroj. Ni ĉiuj formas la eklezion. Estas dezirinde, ke en ĝi estiĝu movado, kiu ekkonos, ekkaptos kaj realigos la gravan taskon. Kvankam ni estas nur malplimulto, ni kredas, ke multaj membroj en nia eklezio atendis tian vorton. Ni invitas ĉiujn, kiuj konsentas, skribi jesante al la prezidanto de nia federacio.

La alvoko ĉi-supra estis aprobita de l' Protestanta Pacligo, en la kunveno la 28-an de aprilo 1946.

(Prezidanto de la iniciatinta federacio estas : Pastro *G. Roggweiler,* Rorschach, Svislando.)

Saluto de Julio Baghy

Se vi ne volas militon,
preparu vin por paco !

JULIO BAGHY
evidente sentas sin bone en la societo de ĉarmaj fraŭlinoj-membrinoj de Esperanto-sekcio de l' Budapesta Polica Societo.

Julio Baghy, nia plej konata romanverkisto kaj talenta poeto, aŭtoro de *Viktimoj, Hura, Pilgrimo* kaj serio da aliaj libroj, sendis al ni salutleteron, el kiu ni volas citi nur la jenajn malmultajn, sed elkorajn frazojn :

Pri mi koncize nur tiom: mi trasuferis ankaŭ la duan kataklismon kaj, se estas permesate diri, eĉ pli hardita mi estas en mia kora konvinkiĝo pri praveco de nia afero. Observante la scenojn de la mondpolitiko, la buŝventoladon de la tutmonda diplomatio, mi estas certa, ke la novaj packontraktoj ne estos ideale bonaj, ke ili havos erarojn, sed se ni, grizaj milionoj, apartenantaj al la diversaj popoloj, celkonscie agados por la rekonstruo de la vera paco, tiuj mankoj kaj eraroj eliminiĝos kaj ni sukcesos kristaligi la spiriton de la nova epoko. De nun la respondeco pri la estonto fariĝis duobla por la esperantistaro tutmonda.

Kompreneble, unu homo sola formas bagatelan kreoforton, sed se ĉiu el ni faros sian *homan* devon por akceli la baldaŭan cikatriĝon de la militaj vundoj kaj partoprenos konscie kaj energie en la paciga laboro de la animkuracado, mi scias, ke nia lingvo kaj ĝia movado havos leonan parton en la konstruado, en la estigo de la humanisma interpopola konduto.

Ĉiu sur sia posteno, tie, kie la Vivo kaj Sorto lokis lin, ne hezitu fari eĉ apostolan agadon, kaj post paso de jardeko la mondo ne plu aspektos kiel infero abomeninda.

Estas nia devo sugesti la penson : *se vi ne volas militon, preparu vin por paco !* Ĉiam tio okazas, kion oni preparas. Sufiĉas el la miljara devizo : se vi volas pacon, preparu vin por milito, ĉar tiu absurda devizo rezultigis ĉiam sangverŝadon, bestiĝon de la homoj.

1500 abonantojn en 45 landoj

atingis Heroldo ĝis la nuna momento. En la pasinta numero ni publikigis la kotizojn por la nova abonperiodo. Al novaj abonantoj ni liveros senpage la numerojn, ankoraŭ aperontajn dum la nuna jaro, post alveno de la sciigo pri ilia abono.

Kondamno de milito — nura ŝerco ?

Okaze de bankedo de la Woodrow-Wilson-Fondaĵo, kies kuratoro li estis, la tro frue forpasinta Prezidanto Roosevelt iam diris interalie :

« Woodrow Wilson faris kuraĝan alvokon, por ĉiuj tempoj kondamni la militon. Sed el la tiel nomitaj ŝtatviroj, kunvenintaj en Parizo okaze de la traktadoj pri la tiel nomita paco de 1919, minimume la duono akceptis lian alvokon kiel ŝercon, kiu ne meritas seriozan konsideradon. Tion mi vidis per miaj propraj okuloj kaj aŭdis per miaj propraj oreloj... Ne la bonfarto de la homaro sed la propra utilo kaj precipe la propra sekureco ŝajnis al la ŝtatoj, reprezentitaj en la Ligo de Nacioj, la plej alta bono.

Roosevelt deiris de la tezo ke danĝero por la mondpaco minacas ne de la popoloj, sed sole de la politikistoj. La evoluo plene pravigis lin.

Espereble la politikistoj intertempe fariĝis pli saĝaj, kaj ankaŭ pli seriozaj. Tiam, sed nur tiam, la UNO havas ŝancon sukcesi pli bone ol la mortinta Ligo.

URTIKO.

Kiel svisa samideano sukcesis restarigi grupon.

Dank' al lerta varbmetodo de malnova samideano Josef Koch, en *Luzern* restariĝis Esperanto-grupo. Ĝi havas 20 membrojn, el kiuj 14 estas junuloj kaj novuloj. Jen kion s-ano Koch mem rakontas pri la maniero, kiel li varbis tiujn ĉi novulojn (laŭ « Svisa Espero ») :

Ĉiam kaj ĉie, kiam mi renkontas amikon aŭ nur konaton, mi priparolas la necesecon de helplingvo (tio estas facila nun, kiam oni konsideras la malhelpojn en la Porpaca Konferenco kaj aliaj internaciaj kunvenoj pro la necesaj tradukoj en almenaŭ tri lingvoj) ; jes, mi parolas pri helplingvo kaj Esperanto speciale. Ili konfesas, ke la temo estas grava, sed nur malmultaj konas Esperanton aŭ aŭdis pri ĝi. Ili tamen ne sufiĉe interesiĝas aŭ « ne havas tempon » ... Tiam mi parolas pri la ebleco de *internacia korespondado,* mi insistas ke per Esperanto ili povus korespondi rekte kun amerikano, svedo, anglo, polo ktp. Tion ili jam pli bone komprenas kaj pri tio ili pli malpli interesiĝas. Li aŭ ŝi promesas pripensi pli funde la aferon ankoraŭ unufoje ... sed mi tuj notas la adreson de tiu interesulo kaj sendas ĝin al la Esperanto-grupo en Amsterdam, Prago, Kopenhago aŭ alia kaj petas ke unu el la membroj skribu simplan poŝtkarton al tiu persono ... Tiam plej ofte, post kelkaj semajnoj, mi ricevas karton : « Ĉu vi povas sendi al mi Esperanto-lernolibron, mi volas provi ĝin unufoje. »

*

Post 25 jaroj.

Oni petis nin represi la jenan artikolon, kiu aperis antaŭ sep jaroj en iu multobligita revueto :

Tre interesan rakonton ni ricevis de Hugo Gerisch, germano, kiu nuntempe loĝas en Picton-Ontario (Kanado). S-ro Gerisch estis ano en la estraro de la Germana Esperanto-Asocio de 1918 ĝis 1922 kaj prezidanto de la Gazetfako. En 1921 li aranĝis, ke 264 tagĵurnaloj germanaj raportis pri Esperanto, multaj el ili ĉiusemajne. Li ĵus ricevis poŝtkarton de s-ino Staritsky-Sevenhuijsen kiu kun sia patro lernej-inspektoro Sevenhuijsen partoprenis la antaŭkongreson (1921) en Dresden. kie li parolis kun ili pri infankaravano al Nederlando. S-ro Gerisch estis en Dresden kune kun sia edzino, 14-jara filino Hilde kaj aliaj knabinoj de lia Esperanto-kurso kaj ankaŭ partoprenis la antaŭkongreson. Sur la ŝipo dum ekskurso sur la rivero Elbe la partoprenintoj kolektis nomojn kaj salutojn en albumojn, kiujn ili ricevis de la urbestro de Dresden kiel memoraĵojn. Tie lia filino konatiĝis kun kelkaj studentoj el Danujo, Norvegujo kaj Svedujo, kaj ŝia edzo estis tiam inter ili. Kompreneble ŝi ne tiam pensis ke li fariĝos la edzo. Li estas s-ro Knud Th. Hansen, apotekisto en Kopenhago, komitatano por Danujo de IEL.

Dum la antaŭkongreso s-ro Gerisch parolis kun multaj nederlandanoj, kaj post la Kongreso en Praha (1921), s-ro Sevenhuijsen kaj filino Nelly vizitis lin en lia hejmo en Auerbach. Dum la vizito s-ro Sevenhuijsen invitis la filinon de s-ro Gerisch, Grete, veni kun la infankaravano al Haarlem. Hilde, la alia filino, estis jam invitita de ges-roj C. Van Dooren al Rotterdam dum la antaŭkongreso.

Baldaŭ post 1921 s-ro Sevenhuijsen mortis, kaj lia sola filino Nelly edziniĝis al sia rusa Esperanto-korespondanto, kaj jen estas la karto, kiun ŝi sendis al Hugo Gerisch post 18 jaroj : « Estimata s-ro Gerisch, Iam en la jaro 1921 mia patro kaj mi gastis ĉe s-ro Gerisch en Auerbach, Vogtlando, kaj antaŭ nelonge mi legis anoncon de vi en *Heroldo de Esperanto,* kaj nun mi demandas min, ĉu vi estas tiu s-ro H. Gerisch. Se jes, respondu al mi kiel vi ĉiuj fartas : vi, via edzino kaj viaj du filinoj Grete kaj Hilde. Certe vi ĝustatempe forflugis el Germanujo. Mi mem estas edziniĝinta kun mia rusa Esperanto-korespondanto. Ni estas tre feliĉaj kaj havas kvin infanojn. Ni loĝas en la sama domo kiel antaŭe. Ricevu multajn salutojn de Nelly Staritsky-Sevenhuijsen. »

*

Al tio ni povas aldoni ke nun, jam post 25 jaroj, s-ro Hugo Gerisch ankoraŭ vivas en Picton, kaj ke ankaŭ la familio Staritsky-Sevenhuijsen bone trapasis la militon en sia hejmo en Haarlem. S-ro Gerisch kaj s-ro Staritsky ambaŭ ankaŭ nun estas abonantoj de Heroldo.

Svend Dragsted kaj la Gestapo

(Fino.)

Eble vi scias, ke la kaptitoj en Froslev ĉiam sciiĝis pri la grandaj okazintaĵoj en la mondo. En la kampejo troviĝis kelkaj sekretaj radio-aparatoj. Unu el ili estis en la priparolita ĉambro de mia amiko.

Estis necese, ke neniu eventuala denunconto eksciu pri la radio-aparato, kaj ĉar oni konis min kaj mian sekretan gazetan laboron, oni petis min transloĝiĝi en la ĉambron, por ke aliaj ne faru tion.

Estis granda laboro, kaŝe havigi ĉiujn partojn por la aparato en la kampejon. Ĉiun parteton ni kontrabandis per aŭtomobiloj, kiuj transportis manĝaĵojn, aŭ per alia maniero, kaj poste iu teknikisto kunigis ilin al la malgranda sed efika aparato.

Sed kie kaŝi la aparaton ? Ho, estis malfacila problemo. Unue ĝi troviĝis super la plafono, t.e. sub la oblikva tegmento. Per segilo ni segis lukon en la plafono ; sed tio ne estis taŭga, ĉar kun iom da atento oni povis vidi la segitajn fendojn. Kaj tio estis tro danĝera.

Tial ni decidis fari ion alian. La litoj en la ĉambro troviĝis en tri etaĝoj, unu super la alia. Ni forigis la matracon kaj la fundtabulojn de la plej malalta lito, kaj poste ni segis per nia malgranda segilo lukon en la planko. Sub la luko troviĝis sablo — la kampejo nome estis konstruita sur erikeja tero —, kaj ni nun faris truon en la sablo. Ni plenigis niajn poŝojn per sablo kaj eliris el la barako, kaj kiam neniu tion vidis, ni malplenigis niajn poŝojn. En tiu maniero la truo iom post iom fariĝis pli granda. Baldaŭ ĝi estis tiel granda, ke tri aŭ kvar personoj povis stari rekte en ĝi, sub la planko, kaj ni ankaŭ devis fabriki ŝtupetaron, por ke ni povu forlasi la truon.

Tien, en la truon, ni metis la radio-aparaton, kaj tie ni aŭskultis la diverslandajn radio-programojn. Elektristo zorgis pri la elektra kurento. Per fakte nenio li faris kontaktŝtopilon, kiu estis tamen treege taŭga. Ĝi nur konsistis el du malgrandaj truoj, en kiujn ni povis meti la elektrajn fadenojn. Neniu povis vidi, ke la du malgrandaj truoj estis kontaktŝtopilo.

Vi eble scias, ke ni en Froslev havis labordevon same kiel en la koncentrejoj en Germanujo. Sed tiu labordevo meritas iom da priparolo.

Oni diras, ke ĉina laboristo estas treege maldiligenta, kaj ke li laboras kiel eble plej malmulte. Sed estas certe, ke la ĉino povus multe lerni de la Froslevanoj koncerne maldiligentecon.

Matene ni iris al nia laborejo kun la fosilo aŭ ŝovelilo sur la ŝultro. Alveninte, ni kutime metis la fosilojn oblikve en la sablon aŭ en la teron, kaj post tio ni apogis nin kiel eble plej agrable kontraŭ la laborilojn. Kiam germana gardisto alvenis, ni prenis niajn fosilojn kaj translokis teramason, ekzemple de unu flanko de vojo al la alia, post kio ni denove ripozis. Se denove germano nin ĝenis, ni do translokis la teramason returne al ĝia antaŭa loko.

Mi povas rakonti ridindan ekzemplon pri la mallaboremo. Iun matenon oni vokis kelkajn kaptitojn el la barako, ĉar ili devis labori tuj sude de la dana-germana limo pri kelkaj tranĉeoj. La kaptitoj formis kolonojn, sed ili ne venis en vestaĵoj, en kiuj ili povus labori ; ekzemple, kelkaj surhavis ŝuojn faritajn el junko aŭ kano. Tial ili devis ŝanĝi la ŝuojn. Sed kelkaj horoj pasis, kaj ili ne estis pretaj. La tuta antaŭtagmezo pasis, kaj je la tagmezo ja estis laborpaŭzo. Je la dektria horo rekomenciĝis labortempo, sed estis tute neeble por la germanaj gardistoj fari la nombron de la laborontoj korekta. Regis tiom da konfuzo, ke la germanoj post kelkaj horoj tute kapitulacis kaj prokrastis la laboron al la venonta tago.

La sekvintan tagon la germanoj post kelkaj horoj sukcesis en tio, fari la nombron de la laborontoj korekta. Ĉiuj staris en la kolonoj. Sed tiam evidentiĝis, ke la germanoj tute ne estis pensintaj pri aŭtomobiloj por la transporto, kaj estis neeble marŝi. Tial la kaptitoj ne povis labori tiun tagon.

La trian tagon la kaptitoj ankaŭ estis pretaj, kaj tiun fojon la germanoj ne forgesis lui aŭtomobilojn por la fortransporto. Ĉio estis en ordo — ili supozis.

Nu, oni veturigis la kaptitojn al la loko, kie ili devis labori. Sed post unuhora laborado eltrovis la germanaj gardistoj, ke ĉiuj fosiloj estis rompitaj. Iu kaptito havis rekordon : li rompis tridek-ses fosilojn.

Post tiu klopodo la germanoj cedis. Kontraŭ la danoj nenio helpas, ili diris. Oni do veturigis la danojn returne al Froslev, kaj neniam plu oni sendis danajn kaptitojn el Froslev por laborado sude de la danagermana limo.

Mi rakontas pri ĉi tio sen troigo. Estas la fakta vero. Oni diris, ke la germanoj havas grandan ordon en ĉio, ke ili organizis ĉion. Sed tio ne estas vera. Ĉe la germanoj regis konfuzo, malordo kaj korupto. La supre rakontita epizodo atestas pri tio.

Iun fojon la germanoj sendis min al danĝera laboro. La kampejo estis ĉirkaŭita per tri larĝaj zonoj da landminoj. Estis proksimume kvindek metroj inter la zonoj. Inter la unua kaj dua zonoj da landminoj la germanoj havis mallarĝan ekzercejon por pafado. Tien germana policsoldato akompanis min kaj alian kaptiton. Kompreneble li kunhavis sian pafilon, preta por ago. Ni devis ripari kelkajn celtabulojn, kaj por fari tion, ni unue devis faligi kelkajn malgrandajn arbojn por havigi materialon por la riparado. Ni devis ĉirkaŭiri iomete por trovi la ĝustajn arbojn. Estis malagrablaj momentoj, ĉar ni ne sciis, ĉu ni ne paŝos sur landminon. Jam kelkfoje okazis, ke germanaj pioniroj — do, ekspertoj — mortis aŭ kripliĝis, kiam ili faris ian laboron inter la zonoj de landminoj.

Iun tagon vizitis la sveda grafo Folke Bernadotte la kampejon de Froslev. Grafo Bernadotte priskribas tiun viziton en sia libro « La Fino ». Interalie li rakontas pri la solena momento, kiam ni kaptitoj fajfis la svedan nacian himnon por honori lin; ja estis malpermesite kanti. Tiun momenton mi neniam forgesos. Mi povas aldoni, ke ni ŝuldas grandan dankon al grafo Bernadotte. Per sia helpagado li savis multajn homvivojn.

En la fino de aprilo mi estis transportata al Svedujo per la sveda Ruĝa Kruco. Ĉe la alveno en Hälsingborg ni estis senpedikigataj. Oni metis ĉiujn niajn vestaĵojn en varmigilon, kaj ni banis. Estis komike, ke estis junaj kaj belaj svedaj virinoj kiuj lavis nin.

Estis por mi granda travivaĵo viziti Svedujon, la landon kun ĉokolado, kun tabako, kun sekvinberoj, kun rizo, kun kafo kaj teo, kun ĉiuj luksaj kaj maloftaj artikloj. La svedoj estis tre gastamaj.

En Svedujo ni ricevis multajn varojn, parte senpage, parte por mono, kiun la sveda ŝtato donis al ni. Mi estis internigita en Svedujo tri semajnojn, nome dek tagojn en Hälsingborg kaj dek tagojn en Smaaland. En Smaaland ni, sesdek personoj, loĝis en kinejo.

Kaj nun mi denove estas hejme, en Danlando, feliĉa ke mi bonŝance trapasis la danĝeran milittempon, kaj ke la potenco de l' Naziismo kaj de ĝia terura Gestapo estas rompita.

Esperanto — nova kuracilo.

Post la unua mondmilito, pro multjara devigita abstinado de plezuro, la amuziĝemo dumtempe estis tre forta. Preskaŭ freneza dancemo kaptis la junularon. Tiam foje, okaze de iu dancvespero, mi havis konversacion kun fraŭlino. En la daŭro de la interparolado mi demandis ŝin, ĉu ŝi jam aŭdis pri Esperanto. « Esperanto ? » ŝi ekkrietis. « Ne. Mi jes lernis Ŝimion, kaj ankaŭ Tangon Milongan, sed pri Esperanto mi ankoraŭ ne aŭdis. Ĉu ĝi estas facila ? Ĉu ĝi venas el Ameriko aŭ el Hispanujo ? Kiel oni ĝin dancas ? »

Dum la lasta milito, foje mi estis skribinta leteron al Svedujo. En ĝi aperis la frazo : « Laŭdire, en Parizo oni ankoraŭ fervore laboras por nia afero. » La cenzuro opiniis tiun frazon suspektinda, kaj mi estis vokata al la « Abwehrstelle » (germana kontraŭspiona polico) en Hago. Je la demando de la inspektoro, kion mi intencis diri per la vortoj « nia afero », mi respondis ke temas pri Esperanto. « Esperanto ? » li diris, « *ĉu ĝi estas stenografio ?* »

Antaŭ nelonge, samideano rakontis al mi ke li foje interparolis kun soldato de la kanada armeo. Iel la samideano direktis la parolon al Esperanto. « Esperanto — kio ĝi estas ? » demandis la soldato. « *Ĉu ĝi estas speco de Penicelino ?* Kaj kion oni kuracas per ĝi ? »

Esperanto *estas* kuracilo. Ĝi kuracas gravajn malsanojn delonge radikiĝintajn en la korpo de la homaro : netoleremon kaj malamon. Ĉi tiuj malsanoj estiĝis precipe pro nekompreno kaj nescio. Kiam la tuta mondo interkompreniĝos per Esperanto, netoleremo kaj malamo laŭgrade fariĝos malpli oftaj, kaj la homaro estos pli feliĉa.

TOJO.

Kion ni ĝis nun ne sciis.

En la aŭgusta numero de multobligita revuo, eldonata en Suda Afriko, ni trovis la jenan informon :

En la redaktejo de « Heroldo de Esperanto » (Köln) pendis kune, sur la muro, la portretoj de Hitler kaj Zamenhof, KIUJ ESTIS SAMGRADE HONORATAJ ... Pli fidelaj Hitleranoj-Esperantistoj eĉ postulis forigi la portreton — de Zamenhof ...

Informo vere interesa, trovita frandaĵo por difinita parteto de la legantaro, kiu ŝatas engluti tiajn agrable ekscitajn pilolojn prefere ol *pensi*. Kurioze nur estas, ke pri tiu afero ni mem ĝis nun nenion sciis. En tiu tempo venis nia nuna redaktoro, kiel tiama « ĉef » redaktoro, preskaŭ ĉiutage en la redaktejon de Heroldo ; sed li ne povas memori ke iam li rimarkis tie Hitler-portreton sur iu muro. Nek en la redaktejo, nek en la administrejo, nek en la presejo, nek en la librokuŝejo, nek en la ... karbokelo. Ĉu kredeble, ke iu el la Herolduloj ornamis sian laborejon per Hitler-portreto kaj rapide ĝin forkaŝis ĉiufoje kiam la ĉefo envenis ? Laŭ nia scio, ne unu el la Heroldo-stabo estis Hitlerano. Nek publike, nek sekrete. La redaktoro (s-ro Berger), la presejestro (s-ro Goppel) ; la kontorestro (s-ro Wieland), la laboristoj kaj helpistinetoj, ili ĉiuj havis nur la deziron ke tiu nova (tiam) reĝimo, kiu pretendis feliĉigi Germanujon kaj la mondon per nova ideologio, kiel eble plej baldaŭ ree malaperu.

Do, la informo en la sudafrika revuo estas vere interesega. Aŭ ĉu ĝi eble ne estas ... *simpla kalumnio ?*

Sed eventuale oni celas per la « redaktejo de Heroldo » la apartan laborejon de la ĉefredaktoro en lia privata hejmo ? Nu, ni proponas, tuj per fluganta raketo ekspedi nin mem al la infero, se iu kapablas aserti, ke iam li vidis sur iu el la 28 muroj de nia siatempa Kolonja hejmo la portreton de iu el la nazi-elefantoj aŭ nazinanoj. Kaj koncerne nian hejmon en Nederlando (de post 1936), kiu ja ankaŭ estis kvin jarojn sub la nazi-jugo, jen propra-iniciata atesto de juda najbaro, feliĉe savita, s-ro M. de Vries, en letero destinita por la nederlanda politika polico, de 11.7. 1945 :

Kiel tipan ekzemplon de lia sintenado (t.e. de T.J.) *mi povas ankoraŭ aldoni, ke neniam troviĝis en lia hejmo portreto de Hitler aŭ de iu el ties vasaloj. Sed jes DUM ĈIU TEMPO troviĝis tie bildo de la juda aŭtoro de Esperanto, D-ro Zamenhof, kiun portreton li nomis SIA « Führerbild »* (t.e. bildo de la Gvidanto).

Sen plua komento.

En la sama artikolo troviĝas alia malvera aserto. Sed ĝi koncernas ne nin, kaj cetere ankaŭ ĝi estas tiel absurda, ke ni opinias superflue nin okupi pri ĝi.

Geskoltoj atentu !

En marto 1946 estis starigita Esperanta fako ĉe Junák, asocio de ĉeĥoslovakaj geskoltoj. Estroj de tiu ĉi fako estas Fr. Buhr kaj St. Leŝinger. Ambaŭ fratoj longe propagandas Esperanton inter skoltoj kaj estas komitatanoj de Esperanto-Asocio de Ĉsl. Respubliko. Nun ni petas ĉiujn alilandanojn ke ili subtenu nian laboron. Klopodu fondi Esperantan fakon ĉe via tutŝtata skolta asocio ! Anoncu, ke ĉsl. geskoltoj volas korespondi kun geskoltoj de la tuta mondo pri skoltaj aferoj, kaj speciale kun tiuj, kiuj volas partopreni venontan ĵamboreon. Adreso : Junák, asocio de ĉeĥoslovakaj geskoltoj, Esperanta fako, Štepánská 61, *Praha,* Ĉeĥoslovakujo.



SAMIDEANA VIZITO ĈE EMINENTA EKLEZIULO.

Episkopo Yusab de Girga fariĝis Patriarko de la koptaj kristanoj.

Kristanismo eniris Egiptujon en la unua jarcento pere de Sankta Marko, kiu estis la unua apostolo de la Kopta Eklezio en Egiptujo. La nuna Patriarko, Papo Yusab (Josefo) 2-a, estas la 115-a apostolo. Yusab 2-a, kiu nun estas 63-jara, fariĝis patriarko antaŭ nelonge. Inter la 2057 delegitoj el diversaj provincoj de Egiptujo kaj Etiopio, kiuj kunvenis por elekti lin, troviĝis nia samideano, s-ro Nasif Mahrus el Fajumo.

S-ro Mahrus ankaŭ estis inter la 22 membroj de komitato, konsistanta el episkopoj kaj laikoj, kiuj akompanis la patriarkon de lia episkopa sidejo en Girga al Kairo, kie okazis lia kronado. La komitato uzis specialan vagonaron. En ĉiuj stacidomoj dum la 500-kilometra vojaĝo salutis la patriarkon nekalkulebla homamaso. Post dek-hora veturo la celo estis atingita.

En Kairo la patriarko estis renkontata de la delegito de l' ĉefministro, la ministro de komerco kaj tekniko, de la eminentularo kaj ĉefpastroj. Ili akompanis lin al la kopta katedralo, kie Yusab 2-a faris malgrandan dankpreĝon.

La kronadon partoprenis delegito de la egipta reĝo, reprezentantoj de la ŝtato kaj de la diversaj kredoj : katolika, greka, armena, protestanta, anglikana, la ĉefprezidanto de la mahometana universitato El Azhar, Lordo Stanisget, kaj pli ol 2000 eminentuloj.

La koptoj, kiuj nombras en Egiptujo unu kaj duonan milionon, estas la veraj pursangaj egiptoj, kies prapatroj estis la antikvaj egiptoj. La kopta popolo havas grandan esperon je sia nova patriarko, ĉar li estas bone edukita, serioza kaj saĝa. Li plenumis siajn religiajn studojn en la universitato de Ateno ; li scias la araban, francan, grekan kaj koptan lingvojn, kaj iomete la anglan.

(La foto estas farita okaze de vizito de s-ro Mahrus kun filoj ĉe la patriarko, kiam li ankoraŭ estis episkopo ; s-ro Mahrus estas la tria de maldekstre.)

G. B. Shaw

(*Fino.*)

Shaw ekkaptis la usonan radio-aŭskultantaron per sia « Malgranda parolo pri Ruslando ». Li donis al Ameriko, kion ĝi petis ; sed la malagrablaĵo estas, ke neniu ŝatas seriozan spritaĵon.

Li diris : « Ruslando priridis, malesperigis, batis, hontigis, kompromitis, aludis kaj preskaŭ finvenkis nin.» Vera aŭ nevera, tio mirigis la homojn.

« Via prezidanto (Hoover), kiu disfamiĝis per nutrado de malsataj milionoj de militruinigita Eŭropo, ne povas nutri sian propran popolon dum la pactempo. » Se multaj el liaj aŭskultantoj ne estus samopiniaj, ili ne estus tiel grandioznombre voĉdonintaj por Roosevelt la sekvintan jaron.

«Nia agrikulturo estas ruinigita kaj niaj industrioj fiaskas sub la pezo de sia propra produktiveco, ĉar ni ne eltrovis kiel disdividi kaj same produkti niajn varojn. » Neniu profesoro de ekonomio en niaj tagoj disputus pri tio. Nek iu profesoro de historio neos, ke Lenin kaj liaj amikoj « ekkaptis la potencon de Sovetio kaj kreis la USSR precize kiel Washington kaj Franklin kaj Tom Paine kreis Usonon ».

Poste li sugestis amuzan dimanĉan ludon. « Kolektu la artikolojn en la rojalistaj gazetoj kaj la politikajn pamfletojn, usonajn kiel ankaŭ britajn, eldonitajn dum la lasta kvaronjaro de la 18-a jarcento ! Forstreku la datojn, la nomon de la lando kaj la nomojn de ĝia gvidinto. La ludo estas por viaj amikoj plenigi la blankajn punktojn. Kiu lando estas tiu, vi demandos, kiu rompis ĉiun socian ligilon kaj dediĉis sin al anarkio kaj malnobleco laŭ ordono de bando da ateistoj, drinkuloj, diboĉuloj, ŝtelistoj kaj insidmurdistoj ? Viaj amikoj konjektos malĝuste. Se la ĝusta respondo estas *Ameriko,* ili krios *Trotzky*. Ili deklaros ke ... *Jefferson* estas *Lenin,* ke *Franklin* estas *Litvinoff,* ke *Paine* estas *Lunatcharsky,* ke *Hamilton* estas *Stalin*. Se vi diros al ili la veron, ili verŝajne neniam denove parolos al vi ; sed vi donos al ili moralan lecionon, kiu devas esti la celo de ĉiuj dimanĉaj ludoj. »

Li avertis, ke Ruslando ankoraŭ ne estas paradizo. « Ruslando estas tro grandspaca, » li diris, « por ke iu registaro en 14 jaroj povu forigi la teruran malriĉeco-senordon, nesciadon kaj malpuron postlasitajn de la carismo... Mi timas, ke ekzistas sufiĉe da malriĉo, nescio kaj malpuro, kiujn ni konas tiel bone hejme ; sed estas espero ĉie en Ruslando, ĉar ĉi tiuj malbonoj retiriĝas tie antaŭ la disvastiĝo de komunismo tiel certe, kiel ili progresas kontraŭ ni antaŭ la lasta malespera batalo de nia bankrotanta kapitalismo por prokrasti sian neeviteblan finon per malaltigo de salajroj, multobligo de tarifoj kaj kolekto de l' tuta latenta sovaĝeco kaj avido en la mondo por ĝia subteno en rabista milito, sub la masko de patriotismo. »

Li faris predikojn al britoj sen limigo, pri moralo, politiko, ekonomio, eduko kaj eĉ religio. Kio koncernas Liberecon, li diris al la angloj, ke ili « ĉesu konjekti pri ĝi », ĉar ili ne scias kio ĝi estas, « neniam ĝin havis ». Senarmigo, kiel diskutita en Ĝenevo, ne interesis lin, ĉar « se mi estu mortigata per bombo, mi preferas, ke ĝi estu tiel granda kiel eble, donante gravecon al la okazaĵo kaj farante pli grandan bruon ».

Kaj pri piaj elverŝadoj rilate la Imperion, li respondis tiel : « Se mi estus fremdulo de alia planedo, mi dirus, ke provo kunligi Anglujon kun Hindujo, antaŭ ol Anglujo estas kunligita kun la Unuigitaj Ŝtatoj sur unu flanko kaj kun ĉiuj siaj aliaj, okcidentaj najbaroj sur la alia, estas freneza renverso de la natura ordo de aferoj, kaj verŝajne ne povas daŭri. »

Li estas vegetarano de sia junaĝo, kaj al gastoj li diris : « Vi ne bezonas timi. Ni havas ĉiam sufiĉe da kadavroj por manĝigi mian edzinon.» Iam, kiam Beerbohm Tree demandis: « Ĉu ni donu bifstekon al Shaw kaj metu iom da ruĝa sango en lin ? », s-ino Pat Campbell respondis : « Pro Dio, ne faru tion. Li estas sufiĉe malbona tia kia li estas ; sed se vi donos al li viandon, neniu virino en Londono estos sekura ! »

Ĉe prezentado de certa kordinstrumenta kvarteto diris amiko : « Ĉi tiuj viroj ludas kune ĉirkaŭ 12 jarojn. » — « Ĉu ni ne estis ĉi tie jam pli longe ? » ĝemis Shaw. La mastrino ĉe la muzik-kunveno demandis lin : « Kion vi pensas pri la violonisto ? » — « Li memorigas min pri Paderewski, » respondis Shaw. — « Sed Paderewski ne estas violonisto, » ŝi protestis. — « Ankaŭ ĉi tiu sinjoro ne estas ! » li asertis.

Shaw laŭdire malŝatis muzikon dum manĝado. Iam li demandis orkestro-gvidiston : « Ĉu vi povus ludi ion, se mi petus vin ? » — « Certe, sinjoro ! » — « Bone, ĉu vi bonvolus kart- aŭ domenludi, ĝis mi finos mian tagmanĝon ? »

Estante 90-jara, li estas ankoraŭ miraklo de agemo. La bildo de lia altkreska figuro, la blankbarba juneco, la senzorga paŝo kaj la kuraĝega rigardo estas vive antaŭ ni. Li faris pli multe por liberigi la reĝolandon de l' spirito por homoj de bonvolo ol ĉiuj instalitaj aŭtoritatoj en Eŭropo kaj Usono.

D-ro A. MILDWURF, Londono.

Isaj Dratwer :

Ne, mi ne pensas...

Ne, mi ne pensas. Mi penas ne pensi. Kvazaŭ per surtirita surkapen litkovrilo mi kovras min per la griza ĉiutageco. Flanken mi deŝovas la rememorojn. Mi bone scias, ke neniu estas, nenio estas. Patrino, patro, hejmo, geamikoj ...

Sed tamen el la kaŝitaj anguletoj de la animo io nekaptebla, kiel muŝo altrudema, memorigas :

Ĉu vi memoras ? !
... La trankvilon de l' hejmo familia ...
Ĉu vi memoras ? !
... La festan tablotukon sur la tablo ...
Ĉu vi memoras ? !

...

Ĉu vi memoras ? !
... La kison post la teatro ...
Ne, mi ne memoras, pri nenio mi pensas, ĉar mi ne volas !
Sed tamen, iam ... mi devas !

Varsovio, Septembro 1945.

****

VERDULAJ VORTOJ

D-ro L.L. Zamenhof :

Ĉiu veraĵo, dum ĝi restas abstrakta doktrino, havas nenian influon sur la mondon ; sed kiam oni ĝin vidas en formo konkreta, en formo de amaso da homoj, kiuj vivas kaj sin movas antaŭ niaj okuloj, kiuj levas standardon, entuziasme bruas kaj kantas, tiam ia mistera forto senkonscie puŝas la rigardantojn al la entuziasmigita amaso, — kaj ideo, kiu ĝis nun ŝvite gutadis, per unu fojo disverŝiĝas en la mondon simile al maro.

(1905.)

D-ro Albert Steche :

La bezono, komunikiĝi persone kaj skribe kun anoj de aliaj popoloj, kreskas. La organoj de tiuj ĉi interrilatoj estas la lingvoj. Oni ne povas lerni ĉiujn lingvojn. Tial la helplingvo estas nepre necesa.

(« D.Esp. ein Kulturfaktor », vol. 3.)

F. Faulhaber :

Tute aparte de tio, ke la lingvo Esperanto estas rimedo de internacia komunikiĝado, ĝia logika strukturo faras ĝin ankaŭ tre grava ilo por la pli bona ekscio de nia propra lingvo kaj por spirita pliboniĝo pri nia scio de niaj ĉefaŭtoroj naciaj.

(« Tra la labirinto », p. 313.)

****

Ni donas la parolon al :

François de Lesseps :

Niaj kontraŭstarantoj ofte estas niaj plej bonaj helpantoj.

La Rochefoucauld :

Estas pli facile kompreni la Homon ĝenerale, ol iun ajn homon speciale.

Jacob Cats :

La plej feliĉiga meblo estas bona edzino.

Sheridan :

La plej senriska vojo por ne erari estas: esti decidema sukcesi.

Inayat Khan :

En la tagoj, kiam vi konsciiĝas ke vi ne scias, vi komencas scii.

Thorbecke :

Ne ekzistas situacio, kiu ne klopodas transiri al alia.

Vondel :

Glavo unufoje eltirita malrapide re-eningiĝas.

Mono-grafio

Mono « nigra ».

Preskaŭ ĉiuj landoj eŭropaj suferegis pro la milito. Preskaŭ ĉiuj fariĝis malriĉaj, kaj por eviti inflacion, ili kreis leĝojn por protekti sian valuton. Tamen la t.n. « nigra » komerco ne observas la oficialajn monkurzojn. Fine de junio, iu svisa bankinstituto publikigis la jenajn « nigrajn » kurzojn (en krampoj la oficialaj) : unu angla pundo 9 sv. fk. (17.34), 100 belgaj frankoj 4 sv. fk. (9.90), 100 francaj frankoj 1.20 sv. fk. (3.60), 100 italaj liroj 0.90 sv.fk. (1.91), 100 nederlandaj guldenoj 42 sv.fk. (162). Kompreneble, la vera valoro de la diversaj valutoj estas pli alta ol tiuj « nigraj » kurzoj. Cetere, eĉ por usona dolaro oni pagis « nigre » nur 3.30 sv.fk., anstataŭ la oficialaj 4.30.

Revenis de semajnfina vojaĝo pli riĉa ol li foriris.

Korespondanto de « Times » renkontis vojaĝinton kiu faris semajnfinan vojaĝon al la kontinento. Li estis kunportinta 75 pundojn (t.e. la maksimuman sumon permesitan). En Ĝenevo li ricevis por unu funto oficiale 17 svisajn frankojn. Li aĉetis silkan ĉemizon kaj arĝentan bruligilon, pagis hotelon kaj ĉion kaj deponis la reston (1200 sv.fk.) ĉe svisa konfidulo. En Francujo li ricevis por la bonhavo de 1200 sv.fk. 120.000 francajn frankojn (nigre), anstataŭ la oficialaj 36.000. Li bonege vivis unu tagon en Parizo, restis al li 112.000 frankoj, kaj ilin li deponis ĉe agento proksime de la Opero. Reveninte Londonon, li vendis la francan deponaĵon por 160 pundoj. Li do ne nur estis farinta belan vojaĝon, dum kiu li bone vivis, sed li krom tio profitis silkan ĉemizon, arĝentan bruligilon kaj — 85 pundojn kontante !

Prefere...

Leganto en Francujo sendis al ni la sekvantan interesan epizodon :

Unu viro mensmalsaniĝis en julio 1939, kaj lin oni metis en frenezulejon por necesa kuracado. Oni bone prizorgis lin kaj flegis. Iom post iom lia cerbo pliklariĝadis, kaj en la komenco de julio 1946 la ĉefkuracisto de la frenezulejo opiniis, ke lia paciento estas denove tute sana, kaj ordonis, ke oni lin liberigu. Do, oni redonis al la ulo la vestojn, kiujn li surportis antaŭ sep jaroj, kaj ĉion, kio tiam estis en liaj poŝoj, inkluzive de dudek-franka ormonero.

Kiam li trovis sin libera sur la strato, la unua penso de la eksfrenezulo estis, ke li regalu sin per luksa tagmanĝo.

« Bonan kaj malkaran restoracieton mi konas ne malproksime de tie ĉi, » li diris al si. « Mi tuj iru ! »

Kaj li iris.

Li mendis kelkajn almanĝaĵojn, bifstekon kun frititaj terpomoj, salaton, pecon da fromaĝo, persikon. Boteleton da vino kaj tason da nigra kafo li trinkis — kaj sentis sin bone. La kelneron li vokis.

— Kiom mi ŝuldas ? li demandis.

— Tricent kvindek frankojn, respondis la kelnero.

Kiom ? Tricent kvindek ... Sed tio estas pura rabo ! Tian monon mi certe ne pagos ! Cetere, tiom da mono mi ne havas kun mi ...

— Nu, tiuokaze, diris la kelnero, al vi mi venigos la estron, kaj vi diskutos kun li.

Al la restoraciestro la kompatinda resaniĝinto rediris, kion li jam klarigis al la kelnero, kaj sian parolon li finis, dirante :

— Nun, faru kion vi volas, sed pli ol ĉi tion mi ne posedas.

Kaj sur la tablon li metis sian dudekfrankan ormoneron. Larĝa rideto ekfloris sur la lipoj de la estro, kiu kun respektoplena ĝentileco diris :

— Ho, sinjoro, mi tuj redonos al vi la ceteron. La kalkulo sumiĝas je tricent kvindek frankoj. Do jen : tricent kvindek kaj kvindek estas kvarcent, kaj sescent faras mil, kaj kvar mil, kvin. Mi pensas, ke tiel la afero ĝustas, kaj ke lia sinjora moŝto honorigos mian modestan gastejon per baldaŭa revizito.

La kliento alrigardas la bankbiletojn per mirigitaj okuloj kaj malgaje diras :

— Prefere rekonduku min tuj al la frenezulejo ...

Milionuloj en Sovetio.

Ankaŭ Sovetio havas siajn milionulojn. Antaŭ la milito vivis sole en Moskvo pli ol tridek rublo-milionuloj, kies plej riĉa estis la verkisto Aleksej Tolstoj. Ĝenerale verkistoj, kantistoj, filmreĝisoroj, sed ankaŭ inĝenieroj, perlaboras multe da mono, kondiĉe ke iliaj kapabloj efektive estas eksterordinaraj. Tamen — ĉiu devas en Sovetio mem « perlabori » sian monon, do ne pere de aliaj, ĉar tion oni konsideras ekspluato. La aĉetpovon de unu rublo en Sovetio oni povas kompari proksimume kun tiu de unu svisa franko en Svislando.

Ĉu ĉio estas ebla ?

Kvankam lastatempe oni multe parolas — ni memoru Byrnes, Wallace, Churchill, Schumacher, De Gaulle k.a. —, tamen oni ankoraŭ alte notas la vortkurzon. Prezentu al vi, ekzemple : Stalin deklaras al angla ĵurnalisto, ke li opinias novan militon neverŝajna, kapitalistan ĉirkaŭbaron ĉirkaŭ Sovet-Unio neokazigebla, kaj la atombombon armilo senefika, ĉar ankaŭ aliaj landoj ĝin havos. Kaj la efiko de lia deklaro ? Jen : malŝarĝiĝo en Moskvo, sed ankaŭ en Parizo, Londono kaj Vaŝingtono. Eĉ pli: la kurzoj ĉe la Novjorka borso leviĝas. Ke la popoloj sopiras la pacon, tion ni scias ; sed kiu imagus, ke marŝalo Stalin, la kontraŭkapitalisto, per nur kelkaj vortoj kapablus servi la kapitalistan klason de Usono per profito de 1 ĝis 5 % ?

La diferenco

Lingvo gepatra :
river' romantike-fabela ;
Universala :
kanalo praktike-laŭcela.

Lingvo gepatra :
kreskej' en dezerto trovita ;
Universala :
ĝardeno laŭ sperto plantita.

Lingvo gepatra :
ĉevalo eterna, nobela ;
Universala :
ekspreso moderna, sinpela.

Lingvo gepatra :
koncerto de kamp' kaj arbaro ;
Universala :
oper', simfonio, fanfaro.

Lingvo gepatra :
ho, mirlabirint' stalagmita !
Universala :
palaco laŭ plan' konstruita.

Lingvo gepatra :
funt', unco, buŝelo, jard', vedro ;
Universala :
jen la kilogramo kaj metro.

Lingvo gepatra :
por propranacia la rondo ;
Universala :
ŝlosilo al tuta la mondo.

TEO JUNG.

Jardo (yard) estas angla,
kaj vedro (wedro) estas rusa mezuroj.

NATURLINGVO.

Ĉe la Naturo ĉio estas lingvo : de la bruega ruiniĝo de granita ŝtonego, kiu de supre sur la montego rulfalas al valo, ĝis la grandega profundo de Oceanoj, ĉio estas lingvo. Lingvo estas en la Suno, kiu per sia radiado revekas la ritman rekomenciĝon de Vivo sur la Tero kaj sur aliaj planedoj de sia orbito ; lingvo estas en la Atomo, kie la elektronoj kaj protonoj, ĉiam en moviĝado, sub impulso de mistera Leĝo de altiro, ŝajnas formiĝi kiel Lakta Vojo. La Homo, esplorante kaj profanante tiun misteran Leĝon, eltrovis grandiozan forton per malintegriĝo de Atomo, tiel ke ĝi fariĝas nun malkvieta, eksploda kaj treege potenca lingvo, kiu povos konduki al detruado de la homaro, aŭ eble al la eterna Paco sur la Tero.

Sed lingvo estas en la Ĉiela Arkaĵo, en kiu miriadoj da sunoj eterne luktas por akiri ... nekonatan forton kaj ... por elmiliti sian vivon en la senlima Spaco. Lingvo estas en la dancflugado, kiun abeloj malŝparas per sia zumado ĉirkaŭ la abelujo plenplena je nektaro, kaj estas lingvo inter la formikoj, kiuj sin komprenas reciproke per subita movado de siaj antenoj. Lingvo estas tiu ĉarma de l' najtingalo, kiu eligas siajn esprimojn de ĝojo kaj doloro per sia dolĉega tono, plena je la plej nuanca esprimado ; lingvo estas la blekego de leono kaj de ĉiuj kataj bestoj ; la hirunda trilo ; la muĝado de arbaro kaj de nepenetrebla forsto ; la akra krio de vesperto; la bojado de hundo ; la grakado de korvoj, la funebra plendo de strigo, kaj la flugetado de papilioj de floro al floro ; lingvo estas la lumetado de lampiroj, kiuj reciproke sin alvokas, la devojiĝinta ŝafeto ekblekanta siajn dezirojn al la grego ; kaj fine la furioza kriego de l' fulmo en uragano, ĉio estas lingvo en la Naturo.

La Homo, senpova kompreni la multlingvecon de l' Naturo, riverencas al ĝi kaj levas al la Ĉielo elverŝon de sia poezio. Li nur kapablas kanti la florlingvon, la roklingvon, la arbaran lingvon kaj tiun de la Oceanoj ; li nur kapablas kanti la lingvon de montoj, de lagoj, de verdaj kampoj plenplenaj je rikoltoj : li kapablas nur imiti la Naturlingvon, starigante alegorian kanton pri la imaga senfina Kreitaro.

CANDIDO RONCOLINI.

RIDO SANIGAS

ESPERANTISTO AL ALIA.

— Bonan tagon, Isidoro, mi delonge ne vidis vin.

— Mi ĵus venis el hospitalo.

— Ĉu malsana ?

— Ne ; faletis super akuzativo kaj rompis kruron.

LI LONGE ATENDIS.

Ŝi : Neĝentile de vi, veni nerazita al rendevuo !

Li : Sed, kara mia, mi certigas al vi ke mi estis razita kiam mi alvenis ĉi tie.

LI MEZURIS.

Sinjoro : Kion tio signifas, homo, ke vi tiel rigardadas min dekape ĝispiede ?

Almozulo : Ho, sinjoro, mi pensis ĉe mi : sinjoro estas precize tiel alta kiel mi, eble sinjoro havas malnovan mantelon por mi.

SUPER LA NORMO.

Edzino : Jen mi legas ke normale homo dum unu tago parolas dekdu mil vortojn.

Edzo : Nu, mi ĉiam asertis ke vi superas la normon.

REDAKCIA LETERKESTO.

Pri adresŝanĝoj. Ĉe adresŝanĝoj informu vian poŝtoficejon, ke ĝi postsendu gazetojn ktp. kiuj eventuale alvenos ankoraŭ al via malnova adreso. Konsideru ke ni kutime pretigas la banderolojn du semajnojn antaŭ la apero de ĉiu numero, kaj ankaŭ via sciigo al ni pri via adresŝanĝo bezonas kelkajn tagojn, semajnojn aŭ (el iuj landoj) eĉ monatojn. Povas soni kurioze sed estas la fakto, ke ni havas legantojn kiuj ŝanĝas sian loĝejon ĉiumonate ; tiuj samideanoj farus bone, havigi al si konstantan adreson ĉe iu entrepreno, kafejo, aŭ ĉe la plej proksima poŝtoficejo.

Kiu ridas ?

Diris marŝalo *Smuts,* la 76-jara sudafrika generalo, honora doktoro de la Leiden'a universitato, okaze de sia vizito al Nederlando, ke li, same kiel Churchill, insistas pri Eŭropa Ŝtatligo kaj plendas pro la multaj malgrandaj ŝtatoj, barantaj al si reciproke la vojojn al progreso kaj unuiĝo, kiuj … dum internaciaj konferencoj ĉiam konfuznaskas *Babilonan lingvomiksadon.* Kiu ridas ?

« La venko — baldaŭ ĝi venos ; la mondo ĝoje nin benos ! »

Ĉu restariĝos GEA ?

La 23-an de septembro okazis en *Frankfurt a.M.* konferenco de kelkaj eminentaj esperantistoj por priparoli la restarigon de Germana Esperanto-Asocio. Inter aliaj partoprenis *D-ro Ziegler* (prez. de « Laboro », München), *L. Puff* (prez. de la grupo Frankfurt), supera studdirektoro *D-ro J. Kreutzer* (gvidanto de grava instruista sindikato), kaj malnova samideano *Carl Barthel.* Oni deziresprimis pri restarigo de GEA, kun D-ro Ziegler kiel prov. prezidanto kaj la Esp.-informoj de « Laboro » kiel prov. organo.

Okaze de propaganda kunveno en Frankfurt la 6-an de oktobro paroladis *eksministro D-ro Strecker* pri la temo « Esperanto kiel ponto al la interpopola interkompreniĝo ». Ĉeestis reprezentantoj de la gazetaro kaj de la Radio.

Kiu povas helpi retrovi la filon de samideano ?

En la nokto de 28-29 aŭgusto 1944 estis paffaligita kun sia aviadilo, en la apudeco de *Boxtel* (N.B.), Nederlando, la flug-oficiro *Keith M. Dean* (milita numero 512754). Lia patro, s-ro Ernest F. Dean, « The Chantry », Stour Street, *Sudburry,* Suffolk, Anglujo, petas informojn, kiuj povas konduki al retrovado de lia filo, kiu de post tiu tempo estas malaperinta. La person-priskribo : aĝo 23-jara, alteco 1.80 metroj, mezbukla, eble maldikaj lipharoj, du ringoj sur malgranda fingro, verŝajne portis arĝentan medalionon « Sankta Kristoforo », iom balbutas. Informojn oni eventuale povas sendi ankaŭ al s-ro Gerrit Nieuwenhuis, Heerenstraat 47, *Wageningen,* Nederlando.

Kion Nederlando kapablas, tion kapablas ankaŭ aliaj.

La subskribojn, ĝis nun kolektitajn en Nederlando por la Peticio al UNO, oni taksas jam je 35-40.000. Per tio, tiu malgranda lando staras ĉefloke en la statistiko pri la petskribo. Antaŭ unu monato kelkaj nederlandaj lokoj estis ensendintaj pli ol 2000 subskribojn : Amsterdam 2512, Groningen 2241, Boskoop (negranda loko !) 2152, Almelo 1969, Hago 1772, Leeuwarden 1725, Leiden 1102, Arnhem 916, Veendam 892, Enschede 800, Rotterdam 633, Dokkum 554. Sed la nederlandaj esperantistoj *ne* estas kontentaj pri tiu rezultato. Ili volas atingi 50.000, kaj pli poste minimume cent mil subskribojn. Kaj kie restos la aliaj landoj ? Ĉar kion la malgranda Nederlando kapablas (kaj simile bone laboris Bulgarujo), tion kapablos ankaŭ aliaj, pli grandaj landoj. Estas ja tiel facile, akiri subskribojn por la peticio, oni devas nur klopodi — ĉe parencoj, konatoj, kolegoj, ĉe siaj klientoj aŭ liverantoj, ĉe la butikoj, kie oni aĉetas siajn varojn, ĉe la buĉisto, spicisto, laktisto. Se vi ankoraŭ ne faris klopodojn, provu, kaj vi miros pri la rezultato ! Se vi jam klopodis, obligu viajn klopodojn ! Paroli al aliaj pri la peticio, estas samtempe la plej bona propagando por nia afero.

20-a SAT-Kongreso.

La 20-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos la 2-7 aŭgusto 1947 en *Aarhus,* Danlando. Prezidanto de la organiza komitato estas Magnus Jacobsen, Brendstrupvej 8, Aarhus, al kiu oni sendu ĉiujn demandojn rilate al la kongreso ; kasisto Holger Hansen, Haslevej 13, Aabyhöj. Kongres-kotizojn oni sendu al : Poŝtĝiro 58199, La Organiza Kongresa Komitato 1947, la kasisto, Aabyhöj. — Aliĝkotizo por SAT-anoj 13 danaj kronoj kaj por gastoj 16 kr. ; por frualiĝontoj (antaŭ 1.6.1947) SAT-anoj 10 kr., gastoj 13 kr.

Aarhus estas la plej granda urbo dana, krom la ĉefurbo Kopenhago ; ĝi situas bele ĉe la orienta bordo de Jutlando apud la maro Kattegat, kaj kun la antaŭurboj ĝi havas 140.000 loĝantojn. Konata ekster nia malgranda lando estas Aarhus precipe pro du grandaj fabrikoj : Sabroe, kiu fabrikas elektrajn frigidigilojn precipe por ŝipoj, kaj Frichs, kiu fabrikas lokomotivojn kaj Diesel-motorojn ; ekzemple, en ĉi tiu tempo ĝi riparas lokomotivojn por la nederlanda registaro. Ankaŭ aliaj vidindaĵoj troviĝas en Aarhus kaj la bela ĉirkaŭaĵo, sed precipe la ĉeesto ĉe mondkongreso estas travivaĵo por la tuta vivo.

R. JORGENSEN, SAT-peranto.

Fondo de kongreskasoj.

En « Nederlanda Esperantisto » proponas s-ro P.J.W. Schilperoord la fondon de kongreskasoj ĉe la Esperanto-grupoj. La membroj ĉiusemajne pagu malgrandan kotizon en la kongreskason. Unufoje jare la enhavo de tiu kaso estas lotumota. La gajnanto uzos la sumon por viziti la Universalan Kongreson. Se li mem ne povas iri, li rezignu ĝin favore al alia kaj mem kontentiĝu per libropremio. Tia kaso ekzistas en Zeist, kaj ĝi jam altiris al la grupo kelkajn novajn membrojn, kiuj deziras eventuale profiti de tiamaniere malmultekostigota kongresvojaĝo.

Memortabulo H.J. Bulthuis.

Ricevitaj donacoj por memortabulo sur la tombon de H.J. Bulthuis ĝis la fino de oktobro gld. 160.58. Pluaj donacoj restas bonvenaj. Direktotaj al Ir. *J.R.G. Isbrucker,* Oostduinlaan 32, *Den Haag,* Nederlando (poŝtĉekkonto 10866).

Ni recenzas.

Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo, 1946, dua parto. Kutima formato, 51 p. kaj kovrilo. Senpaga por membroj. Eldonis IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. — « Nia afero marŝas, kiel evidentiĝas per la ĉiam kreskanta reto de delegitoj montrita en la dua parto de la Jarlibro, » konstatas la ĝen. sekretario en la « Enkonduko ». Kaj vere, la adresaro de la novaj delegitoj ampleksas pli ol 30 paĝojn. Ses landaj asocioj nove aliĝis al IEL : la argentina, bulgara, ĉeĥoslovaka, itala, jugoslava kaj maroka. La libreton kompletigas mallonga leĝa terminaro, verkita de D-ro A. Mildwurf.

Daniel Quarello : Breve Historia del Esperanto. 30 p. kaj kovrilo, 13 x 19,5 cm. Eldonis Quarello & Cia., Casilla de Correos 47 (Suc. 13), Buenos Aires, Argentino. Prezo 0.30 arg. peso. — Hispanlingva propaganda broŝuro, kiu enhavas koncizajn ĉapitrojn pri la neceseco de lingvo internacia, pri la diversaj projektoj, pri Esperanto, ĝiaj sukcesoj tra la mondo, pri la Fundamento kaj ĝiaj 16 reguloj, kaj fine mallongan biografion pri D-ro Zamenhof. Certe la libreto taŭgos por la propagando de nia afero en la hispanlingvaj landoj sudamerikaj.

Ĉirkaŭ la mondo. Kulturinformaj tekstoj por la junularo. Verkitaj de Prof. Agostinho da Silva. 24 - 32 paĝaj kajeroj ilustritaj je formato 11,5 x 15,5 cm. Prezo ne montrita. Eldonas : Manuel de Freitas, Monte da Lupa 49 - 1, Porto, Portugalujo. Ĝis nun aperis 6 volumetoj, el kiuj 2 atingis nin : *La vivo de l' Eskimoj,* kaj *La araneoj.* Ili estas popularsciencaj artikoloj verkitaj precipe por la junularo sed same utilaj por plenkreskuloj. Tiaj verketoj estas ĝis nun ne multnombraj en nia literaturo. Tial ni salutas ilian aperon. Speciale ĝojigas nin ke ili venas el lando, kiu ĝis nun nemulte kontribuis al la Esperanta literaturo.

Pri la religia societo de Amikoj (Kvakeroj) kaj ĝia servado en diversaj landoj. 8 - paĝa broŝureto 15 x 10 cm. Ĝi estas sendita al ĉiuj delegitoj de IEL, kaj oni povas peti ĝin senpage de Kvakera Esperantista Societo, sekr. J.T. Harrod, Green Maze, Godalming (Surrey), Anglujo. Prezidanto de K.E.S. estas D-ro Edmond Privat. Certe oni memoras la multajn helpservojn faritajn de kvakeroj al suferantoj, sendemande pri la nacieco, religio aŭ raso de la helpatoj. Tial ili meritas la intereson kaj bonvolon de ĉiu esperantisto, eĉ de ĉiu homo.

PAROLAS LA LEGANTO.

FUŜKRITIKADO.

Samideano sendis al mi tondaĵon el la alredaktoraj kolonoj de nia « Daily Mail ». Temas pri letero, per kiu esperantisto tre trafe pritraktis la lingvokaoson ĉe la UNO-kunsidoj, kaj montris la solvon.

La letero havas « venenvoston », en la formo de redaktora komento kiu tekstas proksimume jene : « Ses pluaj universalaj lingvoj : Pasilalie, Lingualumina, Volapük, Communia, Kosmos, Anglo-Franca — same kiel Esperanto — ankoraŭ ne sukcesis oficialiĝi en diplomataj rondoj. »

Mi estas iom scivola pri tio, kiom el la legantoj de « Daily Mail » perceptis, kiel fuŝa kaj senbaza estas tiu kvazaŭargumento. Oni devus ne bezoni duminutan pripensadon por konstati, ke la fakto, ke Esperanto (aŭ alia universala lingvo) ankoraŭ ne alpreniĝis, ne taŭgas. Nur tion ĝi pruvas, ke en la mondo la kompreno pri la utileco, se ne diri la nepra bezono, de internacia lingvo ankoraŭ ne estas sufiĉe disvastigita. Jen ĉio !

Se ni povus, ekzemple, enkapigi al ĉiuj industriistoj, ke pere de Esperanto ili povus pli grandskale kaj dise vendi siajn varojn, ĉu oni povas dubi, ke post nelonge ankaŭ la registaroj, vole nevole, devus pli simpatie atenti niajn pretendojn ?

Ŝajnas al mi, ke iama sinjoro, kies baptonomo estis Adolfo, bone studis la metodojn de niaj kritikantoj : pere de konstanta ripetado de ŝajne simpla argumento oni facile sukcesas miskomprenigi se ne ĉiujn aŭdantojn, almenaŭ la plimulton !

Sed, malgraŭe, mi sentas firman konvinkon, ke la kompreno pri la utileco kaj uzebleco de Esperanto (aŭ almenaŭ de universala neŭtrala lingvo) ĉiumonate, ĉiusemajne, eĉ ĉiutage plidisvastiĝas en Eŭropo kaj aliloke, kaj ke tiu kresko de simpatio al la ideo estas tre esperiga simptomo, kaj faktoro kiu tre percepteble pliproksimigos la eventualan venkon.

Kvankam, kiel samideano, mi forte sentas la gravon de la Interna Ideo, mi alte taksas ankaŭ la gravecon de la praktikaj kaj profitdonaj flankoj de Esperanto, opiniante ke multokaze la ne-esperantistoj eksentas subtenemon nur pro tiuj du lastaj kialoj.

Parolante al miaj amikoj pri Esperanto, mi tial tre malofte mencias la kvazaŭ spiritan celon, sed substrekas la ĉiutagan, utilan, kaj mi jam ofte konstatis, ke tiamaniere mi multe pli facile ilin simpatiigas al nia afero.

N.H.C. MACPHERSON.

KIU ESTIS LA PAROLANTO ?

En la usona gazeto « Parade » (14.1. 1945) aperis desegnaĵo de John Groth, farita en Parko Hyde, Londono, en aŭgusto 1944, dum la bombado de tiu brita urbego. La bildo montras paroladanton kaj grupon da aŭskultantoj, kaj s-ro Groth priskribas jene : « La indiferenteco de la plej multe da Londonanoj, kiam minacataj de bombo, estas miregiga : Mi aŭskultis paroladanton en Parko Hyde, unu dimanĉan matenon, kiam fluganta bombo pasis super niaj kapoj. La aŭskultantoj suprenrigardis, kaj la paroladanto paŭzis. Post momento okazis eksplodo malproksime. Senkomente la paroladanto ekdaŭrigis. En la grupo estis brita maristo, usona soldato (G.I.) kaj lia amikino, brita soldato, ano de la « Home Guard » (hejmgardistaro) kaj unu WAAF (virina ano de la aerarmeo). »

Interese estas ke en la bildo la paroladanto staras malantaŭ afiŝego, kiu portas la vortojn : « The London Esperanto Club», kaj super lia kapo flugas la flago Esperanta ! Certe, ano de la Londona Esperantoklubo ekkonus la paroladanton.

D. FAUX.

ENIGMO-KONKURSO N-ro 7.

NOMBRO-ENIGMO.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 ĝi estas esprimo bone konata al ĉiu esperantisto
2 9 6 14 valora fluidaĵo
3 6 13 10 11 14 parencino
4 10 8 7 2 1 14 grava dokumento
5 10 6 3 14 sovaĝa besto
6 8 10 9 2 12 14 postparolo
7 2 11 4 2 3 14 urbego
8 6 3 4 10 12 10 9 14 ekzekuta aparato
9 6 2 8 14 7 4 14 vira nomo
10 4 2 9 14 figuro de diaĵo
11 2 13 6 7 14 literaturaĵo
12 6 5 6 11 14 infero
13 2 1 6 1 14 malagrabla sento
14 4 10 9 10 14 virina nomo.

Sama nombro signifas saman literon. Tri literoj, kiuj aperas dufoje en la gvidvorto (t.e. la unua vorto), havas du diversajn nombrojn. La komencliteroj de la 14 vortoj, legataj de supre malsupren, estas la samaj literoj kiel tiuj de la gvidvorto.

TRI RADIKOJ EN UNU.

La unua estas adjektiva radiko signifanta ion. ŝatatan, la dua estas substantiva radiko signifanta favoran senton, la tria estas verba radiko signifanta (laŭ la Universala Vortaro) « esti en stato de forta malkvieto kaj ekscitiĝo ». Sed :

Kiam la —a —o —as,
Ne plu la koron vi kontrolas,

kaj tiam facile okazas, kion indikas la tri radikoj kune, kun substantiva finaĵo.

*

Por la ĝusta solvo de la hodiaŭaj enigmoj ni fiksis la jenajn libropremiojn :

1. La Amo en la jaro dekmil ;
2. La Virineto en Bluo ;
3. Pejzaĝoj en Aŭstrujo.

Solvoj (sur aparta papero aŭ poŝtkarto, sen aliaj komunikoj, krom la adreso) alvenu ĝis la 20-a de decembro al la redakcio de Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

*

SOLVO de la enigmoj en n-ro 5.

SILAB-ENIGMO.

Planedo, leopardo, ilekso, burleska, oksigeno, nostalgio, arlekeno, imperiestro, observi, oportuna, lekanteto, novembro, elipso, narkotiko, improvizi, omnibuso. — Pli bona io ol nenio.

KIO ĜI ESTAS ?

La litero « R ».

Alvenis 57 solvoj el 14 landoj, el kiuj 44 solvoj el 13 landoj estis korektaj. Kelkaj solvintoj siavice vestis la solvon de la dua enigmo en poezian formon. Jen unu el ili:

Jes en romano, sed ne en novelo ;
Jes en la perlo, sed ne en juvelo ;
Ne en maŝino, sed jes en motoro ;
Ne en la kapo, sed jes en la koro ;
Ne en la suno, la luno, ĉielo,
Sed jes en la tero, kaj ne en la kelo.
Ne en koboldo, sed … jes en Heroldo.
Do estas ĝi bona, litero belsona : R.

*

Pri la disdono de la premioj decidis la loto jene :

1. Pastro D.W. Robson, Chesterfield, Angl.
2. F. Jelenc, Tlemcen, Alĝerio.
3. A. Jensen, Mólholm, Danlando.

EKZAMENU VIN MEM !

Respondoj al la demandoj en la pasinta numero.

21. Joseph R. Scherer ; Fr. V. Lorenz ; John Merchant ; N. Kurzens ; Julio Baghy ; Emma L. Osmond.
22. Hieraŭ mi vizitis kunvenon, kie paroladis eminenta verkisto. Kiam la kunveno estis finita, mi estis prezentata al la fama oratoro. Hodiaŭ matene mi renkontis surstrate la saman verkiston, al kiu hieraŭ mi estis prezentita.
23. a) Hieraŭ en aŭtomobilo mi vidis viron, kiu estis ebria. (Ankoraŭ pli simple kaj pli klare : Hieraŭ mi vidis ebrian viron en aŭtomobilo.)
    b) Ĉu vi donis almozon al la frostotremanta kaj ploranta maljunulino sur la ponto ?
    c) Kiam la veturilo de la monarko atingis la angulon, viro ĵetis bombon, kiu tuj eksplodis.

Novaj demandoj kaj taskoj.

24. Kion signifas la mallongigoj : BEA, D-ro, L.M., pr., LEEN, k.s., LK, ĉ., ICK ?
25. a) Kiu verko de Upton Sinclair aperis en Esperanto-traduko ?
    b) Kiu verko de Th. Storm ?
    c) Kiu verko de Jef Last ?
    d) Kiu verko de Paul Nyssens ?
26. Korektu la jenan frazon, kiu enhavas 21 erarojn : La nockto kommencis, kaj en la proximan mattenon, kiel la suno reen leviĉis en oriente kaj surbriligis la spekule glatta mahro, la tehron estas malaperita.

Esperanta Radio-Kalendaro.

La horindikoj estas laŭ GMT (Tempo de la Meridiano de Greenwich). Mezeŭropanoj kaj nederlandanoj aldonu unu horon. Ni ne povas garantii pri la korekteco de la horindikoj ; eventuale ni petas ĝustigon.

Ĉiutage :
19.00-19.30 Praha 25,34 (sabate, dimanĉe kaj lunde ankaŭ 1571 m).
Lunde :
20.50-21.00 Praha 470 m.
21.10 Warszawa 49,06 m.
Marde :
17.50-18.00 Sofia 32,5 m.
21.50-22.00 Ostrava 325 m.
Merkrede :
16.20-16.30 Hr. Králové-Pardubice 280 m.
Ĵaŭde :
17.05-17.15 Bern 47,28 m. (Eventuale unu horon pli malfrue.)
20.50-21.00 Praha 470 m.
Vendrede :
17.50-18.00 Sofia 32,5 m.
20,30-20.45 Kortrijk 202 m.
21.50-22.00 Ostrava 325 m.
Sabate :
14.00-14.10 Kortrijk 202 m. Esp.-kurso de E. Symoens.

Ankaŭ Hilversum (Nederlando) kaj Sveda Radio elsendas kelkfoje en Esperanto.

Aŭskultantoj ne forgesu skribi al la koncernaj radiostacioj, dankante kaj instigante :

Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII, Ĉsl.
Radiostacio, Bráfova 5, Ostrava, Ĉsl.
Radiostacio, Vychodoĉesky Vysilaĉ, Hradec Králové, Ĉsl.
Sveda Radio, Stockholm, Svedujo.
Radio Sofia, Bulgarujo.
Radio Bern, Svislando.
B.N.R.O., Rijsselstr. 36, Kortrijk, Belg.
Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa.

*

BELA ESPERANTO-LIBRO SENPAGE.

Radiostacio Ostrava aranĝas konkurson. Via tasko estas, skribi al la radiostacio : 1. kion vi pensas pri Ĉeĥoslovakio ? kaj 2. kio vin interesas el la nova vivo en Ĉsl. Respubliko ? — Interesajn leterojn oni publikigos en ĉeĥa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita, ricevos ekzempleron de la gazeto kun lia artikolo kaj Esperanto-libron. Oni petas, skribi sincere kaj koncize. Sufiĉas kelkaj koncizaj, sinceraj frazoj. Adresu al : *Radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakio.*

LA EVANGELIO PER ESPERANTO.

La parolado de s-ro de Hoog, prez. de KUNE, jam anoncita en la pasinta numero, okazos la 22.11., je 17.00-17.15 GMT (18.00-18.15 nederlanda kaj mezeŭropa tempo), ondlongo 415 m. Esperantistoj ĉiulandaj estas petataj, sendi leterojn kaj poŝtkartojn por instigi al daŭrigo de Esperanto-elsendoj, al : N.C.R.V., afd. Omroep, Postbus 5, Hilversum, Nederlando.

ANONCETOJ

Anoncetoj kostas por ĉiuj 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj kvinonon de la jarabono, aŭ 20 b. fk., aŭ 1.— gld., aŭ 5 resp.-kuponojn ; por trifoja enpreso duobla prezo. — Ni senpage publikigas anoncetojn pri serĉataj personoj kaj pri familiaj aferoj esperantistaj : naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo kaj gravaj jubileoj.

Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj, grupo Hago. Ni aranĝos *letervesperon* la 17-an de decembro 1946. Sendu viajn leterojn al s-ro D. de Boer, Druivenstraat 32, *Den Haag,* Nederlando. — Respondo certigita.

Korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj deziras s-ro Iver Svarstad, P.O. Box 1909, *Long Beach,* California, Usono. (15)

Skriba kurso de la internacia lingvo Esperanto en 10 partoj por ĉeĥoslovakaj gesamideanoj. Aŭtoroj : Prof. Jan kaj Karel Filipové. Direkcio : Fr. Buhr, *Praha-Brevnov 414.*

Geknaboj 10-13 jaraj deziras korespondi. Nepre respondos. Adreso : H.A. Appel, Zuidoost-Singel 5, *Bergen op Zoom,* Nederlando.

38-jara komercisto deziras korespondi kun samideanoj. Kurt Gorr, *Berlin-Waidmannslust,* Zehntwerderweg 88, Germanujo.

Korespondadon pri diversaj temoj kun ĉiuj landoj deziras J. Huyzer, Frankendaal 71, *Rotterdam Z.,* Nederlando.

Tutmonda Interŝanĝa Adresaro, Praha-Brevnov 514, represadas ĉiujn adresojn de ekstereŭropaj gesamideanoj tute senpage, se ili deziros korespondi kun ĉeĥoslovakaj gesamideanoj.

Medicinistoj ! Mi deziras fondi revuon « Medicino Internacia », publikigonte la plej gravajn kaj plej ĝisdatajn progresojn de la medicinaj sciencoj. Mi petas la medicinistojn de ĉiuj landoj, kiuj estas emaj aboni la revuon kaj kunlabori, ke ili sciigu min senprokraste. Por la korespondado bonvolu aldoni 2 internaciajn respondkuponojn. — D-ro Karlo *Mezei,* universitata asistanto, Kossuth-ucca 32, *Debrecen,* Hungarujo.

La Internacia Katolika Informejo, sekretario : Fr. M. Monulfus, *Loonopzand,* Nederlando, senpage donas informojn pri la katolika religio al nekatolikoj. (4)

Pensologio. Serio de 12 libretoj pri Pensologio. Celas helpi homojn de ĉiu religia krednuanco. Specimeno senpage. Dekduo kontraŭ kvar respondkuponoj. Hipsley, 17 Abbots Road, *Birmingham 14,* Anglolando. (14)

H. C. Andersen : La Malbona Suvereno. Tradukita en Esperanto sen supersignoj. Sendu al mi unu resp. - kuponon, kaj vi ricevos tiun aktualan legendon. — H. P. Frodelund, Lisesmindevej 4, *Odense,* Danio. (10)